## La 34-a PSI en PLAUEN

La unuan fojon la Printempa Semajno Internacia okazis en la plej sudorienta parto de Germanio en la urbo *Plauen* de la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 2018. Ĝi situas proksime al la ĉeĥa landlimo. La urbo havas ĉirkaŭ 65 200 loĝantojn. Ĝi famiĝis kaj riĉiĝis pro punto-farado. Ĉi-jaran PSI organizis familioj Haumer, Buhr/Weil, Klünder kaj Sawitzki kun surloka helpo de aliaj esperantistoj. Al la aranĝo aliĝis 109 samideanoj el 10 landoj kaj preskaŭ ĉiuj alvenis. Ni loĝis en la centro de la urbo en speciala loko de iama fajrobrigadejo transformita en junularan gastejon. La interno de la konstruaĵo rememoris pri tio per diversaj ornamoj kaj surmuraj desegnaĵoj.

La programo kontentigis ĉies postulojn. Okazis programeroj por etuloj, infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. La plej malgrandaj infanoj ĝuis Mazi-kurson kaj vespere piĵamajn rakontojn de Nicky Janssen, kiu ankaŭ dumtage okupis aliajn per manlaboroj. Krom diversaj desegnaĵoj, bestetoj, maskoj, ludiloj, saketoj kaj tortoj el teleroj, la infanoj fervore kontribuis al pretigado de vera torto farita el biskvitoj kaj bombonoj por du feliĉulinoj festantaj naskiĝdatrevenon. Kia ĝojo manĝi ĝin poste.

Gejunuloj ĝuis diversajn ludojn ekstere kaj interne de la konstruaĵo. Plaĉa por ili estis kaosludo, dancado laŭ indikitaj paŝoj helpe de komputilo, solvado de Rubik-kubo, ĵonglado, origamio kaj aliaj. Eblis ankaŭ ŝakludi per grandaj figuroj en la korto de la konstruaĵo. Multaj ŝatis glitadon sur fajro-stango instalita en la domo. Infanoj ĝuegis aktoradon en mallonga filmeto pri fajrobrigadistoj inventita kaj reĝisorita surloke de Christoph Frank kaj Ralf Haumer. Dum la semajno eblis ĉeesti E-kursojn de diversaj niveloj, lingvajn ludojn kaj interesajn kvizojn.

Plenkreskuloj ĝuis diversajn prelegojn, en kiuj oni akiris novajn sciojn pri sindefendo, pri amo, pri tajdo, pri komunumo Hermusando en Svedio kaj ĝia daŭripova evoluo, pri mondaj heredaĵoj de UNESCO en Ĉeĥio, pri la vivo kaj verkoj de la ĉeĥaj fratoj Ĉapek, pri divenaparato. Al aliaj interesaj programeroj apartenas la ŝatata ovoserĉado, cirklodancado kaj fotokonkurso.

Pri la aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Okazis intervjuoj kaj poste aperis artikolo en loka ĵurnalo. Kiel kutime dum la tuta aranĝo funkciis libroservo prizorgita de FEL (Flandra Esperanto-Ligo). Kelkaj interesuloj grupiĝis por kantado kaj muzikado. Matene eblis ekzerci ĉigongon pri kiu spertas Dieter Menke, antaŭtagmeze praktiki viglan zumbon kun Zoja Haumer kaj post la vespermanĝo malstreĉigan gimnastikon kun Anna Dupechaud. Di-kredantoj povis ĉeesti Matenan Laŭdon.

Post la tagmanĝo okazis ĉiutage ekskursoj kaj promenadoj. Eblis viziti infanan amuzparkon, drakan kavernon, hidroelektran stacion, muzeon pri brodaĵo, *Elster*-ponton, ban-komplekson *Agua Word*, urbogvidadon per speciala historia bierelektra tramo, aŭtomobil-muzeon en *Zwickau* kaj du aliajn lokajn muzeojn. Ni mem vizitis la urbojn Hof, Elsterberg, Greiz kaj ĉe la forveturo Waldsaasen.

Vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Koncertis por ni grupo Ĵele kaj Kaŝi. Christoph Frank transportis nin per magia vojaĝo tra la mondo al Italio, Ĉinio, Hindio, Ĉilio, Usono kaj prezentis kelkajn surprizajn magiaĵojn, kiujn ni tre ĝuis. Gaja etoso regis dum la paska fajro kun rostado de pastaĵo sur stango. Originala estis vespera balo en fajrobrigadaj kostumoj pruntitaj surloke. Ankaŭ nokta promeno tra la urbo kun loka gvidanto plaĉis al ĉiuj, kiuj ĝin partoprenis. Malfrue vespere eblis spekti kinejajn filmojn kaj babili en trinkejo kun amikoj. Lasta adiaŭa vespero estis dediĉita al niaj talentuloj. Eksonis muzikado, kantoj, Danka Leyk organizis cirklodancon kun kandeloj, estis prezentita la filmeto "Fajro" pretigita surloke, Ralf Haumer prezentis kaj invitis la ĉeestantojn al la venonta PSI, kiu okazos en *Hochspeyer/Rejnland-Palatinato* (proksime al *Saarbrücken*) de la 15-a ĝis la 22-a de aprilo. Ĉiuj estas bonvenaj al tiu agrabla renkontiĝo, kie oni festas Paskon kaj bonvenigas printempon! Per dankoj al la organizantoj kaj prelegantoj finiĝis la ĉi-jara PSI.

*Liba Gabalda*